# EKO 2025

**Unesko jam 70**

EKO 2025-25. Junio 10. Pezo: Word 40, PDF 500 KB, Alkroĉaĵo Unesko Sume ? KB

## Grava memordato por Unesko

La 10-an de decembro 2024, sesdeko da esperantistoj el amerikaj kaj alikontinentaj landoj kunvenis en Montevideo por festi la 70-an datrevenon de la konsultaj rilatoj de UEA kun Unesko (vd UEA inter la internaciaj organizoj). La evento okazis en aneksaĵo de la Parlamenta Palaco, kie en 1954 estis akceptita la unua rezolucio de Unesko favora al Esperanto. Ĉeeste alparolis Ana Olivera, prezidanto de la Ĉambro de Deputitoj de Urugvajo, (***SMG:*** Kiam ni ĉeestis, ŝi estis la urbestrino de Montevideo, kiu parolis en la inaŭgure de la kongreso de ILEI en 2914.

Gvidis la kunsidon Guy Matte (Kanado), kunordiganto de la Amerika Komisiono de UEA, kaj Sonia Risso, prezidanto de Urugvaja Esperanto-Societo. Humphrey Tonkin, Mireille Grosjean kaj François Lo Jacomo traktis plurajn aspektojn de niaj rilatoj kun Unesko, kaj Karine Ducloyer, francino loĝanta en Urugvajo, prezentis la unuan universalan ekspozicion de Esperanto, okazinta en Montevideo en 1954, per kiu delegitoj ĉe la Oka Ĝenerala Konferenco de Unesko konvinkiĝis (***SMG:*** Tio okazis pro ege ruza taktikado flanke de Ivo Lapenna) voĉdoni favore al nia rezolucio. Legu la plenan tekston en la alkroĉaĵo.

## La 13-a kongreso de kroataj esperantistoj

Legu la artikolon de Spomenka Štimec pri la 13-a kongreso de kroataj esperantistoj, kiu okazis de la 16-a ĝis la 18-a de majo 2025 en Slavonski Brod. Plej maldekstre en la foto staras Marija Jerkovics, estrarano de ILEI. Partoprenis almenaŭ unu hungaro.




[https://sezonoj.ru/2025/05/kroatujo-7/](https://sezonoj.ru/2025/05/kroatujo-7/).

## UK en Brno atingis la milan aliĝon!

La EKO-komunikoj antaŭ kvin minutoj gratulis al UEA pro tiu atingo! Je la 6-a de junio la aliĝoj sumis je 1002 el 62 landoj. Elstaras Ĉeĥio 112, Germanio 111, Francio 80, Hungario 39. Ĉinio 35, Koreio 34, Usono 31 kaj Brazilo 30.

## Juniaj festoj

En junio ni festos okaze de la naskiĝdatrevenoj de **Anna Bartek** (Anjo Amika, 70 jaroj) kaj **Giorgio Novello** (65 jaroj): ni gratulas kaj bondeziras! La junia listo de Esperantaj jubileoj kaj memordatoj, kompilita de Aleksander Korĵenkov, enhavas ankaŭ la nomojn de Lakshmishvar Sinha, Umesao Tadao, Aleksandr Postnikov kaj de aliaj forpasintaj esperantistoj. Legu en *La Ondo de Esperanto* https://sezonoj.ru/2025/06/junio-12/

## En Japanio aperis artlibro el Germanio

Mi, eldonanto de HORIZONTO en Japanio, eldonadas serion de 'Esperanto por mi – 16 esperantistoj portretitaj de Helga Ploetner'. En aprilo mi eldonis la 8-an libron. Mi sendas la reklamon pri tiu libro. Bonvolu legi la alkroĉitan ilustritan tekston kaj mendu la artaĵojn.

**HORI Jasuo.** Retadreso: hori-zonto@r.water.sannet.ne.jp

## Poezio en la Hispana Kongreso

Antonio Valén analizas unu el la plej konataj poemoj de Antonio Machado en rilato al Sorio (Soria), en la 83-a Hispana Esperanto-Kongreso. https://youtu.be/sL0ePqguT48

mga

## Universitatanoj denove por la 61-a fojo

Tio okazis en la dua de junio kun du prelegantoj:

**Arko Gong:** Esperanto en ĉinaj universitatoj

**Ilona Koutny:** projekto de nova Interlingvistika fako en Eŭropo

Organizis kaj gvidis Alessandra Madella kun la helpo de Viko kaj Ahmad Reza Mamduhi. La registraĵojn de la antaŭaj sesioj spektu en la jutuba kanalo de UEA: https://www.youtube.com/playlist?list=PLfebd4xxn3CMqTrpXMay2YVfrhDYT-Vm5

## Semoj de amikeco




Elkoran gratulon al Ranja Zafinifotsy (teksto) kaj Németh S. Csaba (ilustraĵoj) pro tiu ĉi valora libro. Ĝi kortuŝe prezentas la esencon de nia esperanta kulturo.

Jen PDF-dosiero: **https://libro.ee/book.php?id=3874**

**Ullrich Matthias**

## La sep valoj

Publikiĝis centra mistika verko de Bahá'u'lláh en Eo-traduko »La Sep Valoj« estas verko revelaciita en la 1850-aj jaroj de Bahá'u'lláh, la profeto-fondinto de la Bahaa Kredo, kiam li post retiriĝo al la montoj de Kurdio revenis al Bagdado. La temo de la verko estas sentempa kaj senloka: la internaj veroj de religio. Ĝi estas mistika priskribo de la vojaĝo de la animo tra sep

stadioj de interna transformiĝo respektive de la transiro de la homa memo ekde la mondo materia ĝis la transaj sferoj proksimaj al Dio.

La Bahaa Mondcentro en 2019 publikigis aŭtoritatan tradukon el la origina persa al la angla. Tiu nova traduko nun anstataŭas la ĝistiamajn provizorajn kaj el ĝi faris traduka teamo de Bahaa Esperanto-Ligo la esperantigon.

Tiu ĉi nova traduko aldoniĝas al gamo da ĉerpaĵoj el la abunda bahaa literaturo alirebla en Esperanta traduko. Tiel BEL jam en 1994 aperigis sub la titolo »Perloj de l' Saĝo« kompilaĵon de citaĵoj el la verkaro de Bahá'u'lláh. Lian centran teologian verkon »La Libro de Certeco« siatempe jam Lidia Zamenhof tradukis, sed ĝi restis nepublikigita manuskripto, kiun tamen BEL alirebligas tra sia retejo. La ĝis nun plej ampleksa verko tradukita estas la preskaŭ 500-paĝa »Dio preterpasas«, la aŭtoritata historio de la unuaj cent jaroj (1844–1944) de la Bahaa Kredo eldonita en 2023 okaze de la 50-jariĝo de BEL; ĝi haveblas kaj libroforme kaj per PDF tra la BEL-retejo.

## Kaŭno: dek faktoj

En la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* ĵus aperis artikolo de Antanas Visockas "Dek interesaj faktoj pri Kaŭno", la urbo de la 59-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj.
Legu ĝin ĉe https://sezonoj.ru/2025/05/bet-195/ kaj aliĝu al BET-59.

## Aminda sed ne sufiĉe amata

La ELSENDO numero 152 de Aminda Radio Esperanto estas disponigita al vi ĉiuj kaj ĝi entenas kiel kutime kelkajn novaĵojn de la kuranta monato kaj la sekvon de la artikolo pri kelkaj kutimoj de la etno Betsimisaraka en la nordoriento de Malagasio. Ni precizigas al vi ke la junia podkasto estos nia lasta elsendo, ni ĉesos produkti elsendaĵojn pro manko de intereso kaj subteno. Ni bondeziras al vi ĉiuj agrablan aŭskultadon !

https://youtu.be/IPhUYCJaJ9c

## Junulara Kongreso en Indonezio




La 81-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) de TEJO okazos de la 9-a ĝis la 16-a de aŭgusto 2025 en Cisarua (Bogor), Indonezio. Tiu estas la unua IJK kiu okazos en Indonezio, granda insularo en Sudorienta Azio konata pro sia kultura, ekologia kaj lingva diverseco, kaj krome pro multaj lokoj proklamitaj kiel mondaj heredaĵoj de Unesko. La kongresa temo estas *Diverseco, solidareco kaj toleremo.*

Kongresanoj povas aliĝi al abundaj opcioj de antaŭ-, dum- kaj postkongresaj ekskursoj kaj krome komforte veturos inter la ĉefurbo Ĝakarto kaj la kongresejo, *Alfa Resort Hotel* per niaj specialaj buskaravanoj. En la programo, atendas vin vasta gamo de lernigaj, interagaj, sportaj kaj distraj aktivaĵoj, taŭgaj por ĉiuj aĝoj, lingvoniveloj, kaj emoj. Krome, eblos ankaŭ KER-ekzameniĝi skribe pri la nivelo C1: al individuaj membroj de TEJO disponeblas repago de 20€. Individuaj kongresanoj povas proponi programerojn ĝis la 30-a de junio.

Ĝis la dua de junio aliĝis pli ol 140 homoj el 33 landoj, el kiuj plej multaj aliĝis el Indonezio (22), Japanio (12), Aŭstralio (12), kaj Ĉinio (8). Filipinoj kaj Vjetnamio (po 7),

Orienta Timoro (6), kaj Tajlando (2). Dum IJK 2025 vi profitos de la unika okazo konatiĝi kaj amikiĝi kun samideanoj el Azio kaj Oceanio, multaj el kiuj partoprenos sian unuan internacian Esperanto-aranĝon. Dum IJK, specialan okazon prifestos kongresanoj: la 80-an datrevenon de la sendependiĝo de Indonezio el Nederlando en 1945. Okazos buntaj kulturaj programeroj por elmontri la kulturan diversecon de Indonezio per tradiciaj dancoj, teatraĵoj kaj muzikaĵoj. Kongresanoj povas aliĝi al abundaj opcioj de antaŭ-, dum- kaj postkongresaj ekskursoj kaj krome komforte veturos inter la ĉefurbo Ĝakarto kaj la kongresejo, *Alfa Resort Hotel and Conference,* per niaj specialaj buskaravanoj. En la programo, atendas vin vasta gamo de lernigaj, interagaj, sportaj kaj distraj aktivaĵoj, taŭgaj por ĉiuj aĝoj, lingvoniveloj, kaj emoj. Krome, eblos ankaŭ KER-ekzameniĝi skribe pri la nivelo C1: al individuaj membroj de TEJO disponeblas repago de 20€. Individuaj kongresanoj povas proponi programerojn ĝis la fino de junio.

## Saluto de ILEI al kultura festivalo

Mi salutis nome de ILEI dum la Kultura Festivalo kaj Akademiaj Interŝanĝoj por festi la 40-jariĝon de Tonglu-a Esperanto-Ligo. Partoprenis pli ol 90 homoj el la tuta Ĉinio.

Alessandra Madella

## Marina revenis, recenzo enis

En la marta eldono de *La Ondo de Esperanto* aperis recenzo de Wolfgang Kirschstein pri la romano *La nepo de Marina* de Sten Johansson. Nun ĉi tiu recenzo, titolita "Marina revenas" estas legebla ankaŭ en la reto ĉe **https://sezonoj.ru/2025/05/recenzo-158/**

# EKO 25 EN 2025!

========= vortoj: 1120 =========

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj

Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj, Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**Dudek numeroj de 2025 aperis, kune kun la kvardek kvar numeroj de 2024**

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.